

Sennaciulo estas la oficiala organo de SAT  
marto - aprilo 2009, n° 3-4 (1245 - 1246)  
Prezo € 5

# SENNACIULO

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens-, kaj agadkapablo! --- Lanti

Kongres-temo 2009 : Migri senlandlime, vivi sennaciece



**NIA DOSIERO – EKSTREMDEKSTRO EN EŬROPO**

## Deliraĵo far Sire



### Dosiertemo por venonta Sennaciulo: "Infanoj endanĝerigitaj"

## Eldona fako kooperativa: Kio ĝi estas

La eldona fako kooperativa estis kreita komence de 2007, post referendumo sekve al propono en la beograda SAT-kongreso de 2006. Ĝi celas faciligi la plenumon de la statutaj taskoj de SAT per eldono de kleriga materialo, pretigita kadre de kolektiva laboro kaj kun laŭeble kohera eldonpolitiko, ankaŭ kolektive difinita. La eldona fako estas kooperativa. Tio signifas ke ĝi financas siajn eldonojn per la profito akirita dum la vendo de antaŭaj eldonoj. Tiu sistemo ebligas ankaŭ eldonon de valoraj libroj, kies vendebleco estas limigita.

Kvankam la eldonprezoj por la paperaj eldonaĵoj de la kooperativo estas kiel eble plej malaltaj, ili tamen certe restos tro altaj por kelkaj kamaradoj. Tial estas antaŭ-vidite senpage havigi 10 procentojn el ĉiuj eldonitaj libroj al nepagipovaj kamaradoj. La eldona fako celas zorgi ankaŭ pri elektronikaj eldonoj, por faciligi la diskonigon de dokumentoj ne adaptitaj al la papera formato, kaj plu plialtigi la kvaliton de la SAT-kultura retejo.

[www.satesperanto.org/eldonkooperativo](http://www.satesperanto.org/eldonkooperativo)



## Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE S.A.T

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta,

FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.

Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: [satesperanto@free.fr](mailto:satesperanto@free.fr); TTT-paĝoj: <http://www.satesperanto.org>;

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA : satx-s

Plenum-Komitato de SAT :

Prezidanto : ne jam elektita

Ĝenerala Sekretario : Kreŝo Barkoviĉ

Kasistino : Thérèse Sabatier

Membroj: , JoBo Bannier, Guy Cavalier,

Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Arturo Prent, Jakvo Schram



Redakta Komitato - Kreŝo Barkoviĉ, Robin Beto, Tonyo Del Barrio, Frederic Scibor, Jomo Ipfelkofer, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Vito Markovo, Cindy McKee, Gary Mickle, Viola Murasaki, Cyril Orsingher, José Maria Salguero (Kani), Serge Sire, Jakvo Schram. Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de S.A.T.

Tekstojn vi sendu al [Sennaciulo@telenet.be](mailto:Sennaciulo@telenet.be) - aŭ al Jakvo Schram Hof ter Bekestraat 49, BE-2018 Antwerpen

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 1-a de majo 2009.

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimensuel. Le directeur de la Publication: Jacques Bannier; Abonnement annuel/jara abo-no France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567

# Temaro/ SAT - novaĵoj

- P-4 : Dekstro-maldekstro: iu historia superflugo  
P-5 : Radikala dekstrismo en Hispanio  
P-7 : Hannah, Gotthold kaj la aliaj  
P-9 : Komunikaĵo el la registaro de Svislando  
P-11 : “Noblaj sovaĝuloj” taskitaj atesti por rasismo  
P-12 : Ĉu ekster Pollando homoj ne scias, kiu konstruis la naziajn koncentrejojn?  
P-14 : La krizo de dekstre - maldekstren  
P-15 : Christoph Blocher kaj la Svisa Popolpartio  
P-18 : Kampanjo por abolo de etarmiloj  
P-19 : Virina tago 2009  
P-20 : Du krabularoj --- malnova kaj nova  
P-21 : Nuntempa Ĉinio: kia reĝimo  
P-22 : Ĉinia diluvo  
P-23 : Ĉu klasoj eĉ en laborista klaso?  
P-24 : Seula diluvo  
P-25 : Malespera jarfino en Japanio  
P-29 : Ribelo en Grekio  
P-32 : Sanela kaj Lidija  
P-33 : Nuntempa sklaveco/libereco  
P-34 : Saluton de Prilep en Makedonio  
P-35 : Komunista Frakcio de SAT  
P-36 : Via voĉo, opinioj, leteroj kaj plendoj  
P-37 : Klarigo pri tjaŭŝjaŭling  
P-37 : Al muso  
P-38 : Rekte, kuraĝe, elegante!  
P-41 : Blanka gazalo pri Gazao

## Donacoj al nia asocio (en € )

Barkovic Kresimir dumviva+	52
Sabatier Tereza transporto anonime	137
Bore Raymond dumviva +	125
Dejean Nicole ghis 2016 +	52
Floch Charles	6
Redoulez Marcel	3
Gueguen Raymond	5
Sadier André	2
Dehan Pierre	28
Dufourg Henri	28
Bandini Alberto	50
Jiri Bues Friedel	48
Gary Mickle anonime	8
Ljo	125
A.Pinto de Sousa	23
	48

## Novaliĝoj

35888 LEE Eunju (Zelkovo), 101 ho, Munwondong 115-58, Gwacheon-si, Gyeonggi-do, KR-427-090, Koreio

35889 JEON Jin-kyoung (Kampo), Sangdong 444-1, Wonmi-gu, Bucheon-si, Gyeonggi-do, KR-120-815, Koreio

35890 NAM Kyoyong, Ssangyong-A-jin A.P.T 101/103, Sangangdong, Buk-gu, Ulsan-si, Koreio

35891 HENRIKSEN Kim, Hallandsgade 6, Copenhagen S DK-2300, Danio

35892 LEE Jerry, 202 ho, Yonhi-dong 187-45, Seodaemun-gu, Seoul, KR-120-815 Koreio

## Nekrologo

La 11-an de januaro 2009 forpasis en Frajburgo nia k-dino Liesel Nagel matr. 32645 Naskiĝinta la 14an de julio 1925, ŝi aktivis en SAT ĝis 2001, kaj restis interesita je la politika enhavo de Sennaciulo dumvive. Ni kondolencas al la familianoj kaj al Frajburgaj esperantistoj.

La 10-an de februaro 2009 forpasis en Sabadell nia k-do Vicente Hernandez Llusera matr. 32490

Naskiĝinta en 1915, li estis membro de la Organiza Kongres-Komitato, por la SAT-kongreso okazinta en Sant Cugat del Vallès en 1986. Instruisto de Esperanto, kunfondinto de KAE (Kultura Asocio Esperantista) kaj aktive rolis en la Sabadell-a Esperantomovado. Ni kondolencas la edzinon, filinon, bofilon kaj genepojn.



**Ramon Manau Torres**



## Dekstro-maldekstro: iu historia superflugo

Djémil Kessous

Dekstro kontraŭ maldekstro... Tiun politikan dispartigon oni tradicie datas de la franca revolucio. En 1789 la deputitoj, kiuj favoris la reĝon, pli precize lian vetorajton, grupiĝis dekstre de la parlamenta prezidanto, iliaj kontraŭantoj iris maldekstren. Depost tiu evento, ĉiulande, oni taksas konservema aŭ reaktia la dekstrularon, progresema la maldekstrularon, kaj ekstreme de tiuj ambaŭ flankoj oni vidas tiujn, kiuj aktivis al la plej radikalaj solvoj favore al unu el tiuj ambaŭ tendencoj.

La 19a jarcento sekvas la francan revolucion. Ĝi estas la momento kiam komencas furori la Modernepoko kun ties ambaŭ esencaj elementoj, ekonomia (la kapitalismo) kaj politika (la naciismo).

1/- Rilate la kapitalismon, la diversaj sintenoj aspektas klaraj, almenaŭ dekomence. La dekstrularo, ligita kun la riĉularo kaj la regantaj klasoj, firme apogas la kapitalisman sistemon. La maldekstrularo celas dekomence ĝin nuligi, transpasi... poste, pli modeste, nur reguligi.

2/- Rilate la naciismon, la sintenoj de la diversaj politikaj movadoj ne estas tiel klaraj. Dekomence, en la tuta Eŭropo, multaj progresemoj estas fervoraj naciistoj kaj partoprenas en la kontraŭfeŭdismaj

movadoj, notinde en 1848 (la t.n. "Printempo de la popoloj"). Cetere, tiu juna naciismo aspektas iel romantika, ĝi ankoraŭ ne havas aĉan tonon.

Turnopunkto okazas fine de tiu 19a jarcento, kiu iomete komplikigas tiun priskribon. Tiam kelkaj dekstraj tendencoj, ĝisfreŝe pli malpli katolikaj, rojalismaj, adoptas la naciismon kiel doktrinon kaj aktivis favore al ĝi. Samtempe, tiun naciismon ne nepre forĵetas la maldekstrularo, notinde la social-demokratio; ĝi tamen, estas prefere inter-naciisma, celante pace kunvivigi la diversajn naciajn entojn. Unuafoje, aŭgusto 1914 fiaskigas tiun bondeziron.

La naskiĝo de la faŝismo,



komence de la 20a jarcento, tute ne klarigos nian aferon. Fakte, depost la velko de la socialisma espero fine de la 19a jarcento – kune kun la burĝiĝo de la socialismaj partioj, poste la malsukceso de la bolŝevisma revolucio, kiu restas izolata, samtempe la disvolviĝo de

juna kaj vigla kapitalismo en Usono ebliganta altan vivnivelon – politikaj aktivuloj serĉas aliajn vojojn, trian vojon inter la burĝa kapitalismo kaj la ŝtata komunismo, kiu montriĝas pli kaj pli aŭtoritata.

La bolŝevistoj ege esperis pri tutmonda proleta revolucio. Tiu espero ne estas realigita. En centra Eŭropo (Hungario, Germanio, Aŭstrio) la proletaj konsilantaroj estas venkitaj. Sekvas tie, aŭtoritataj reĝimoj, naciismaj, kiuj povas jam esti faŝismaj: en 1922, Mussolini kaptas la potencon en Italio, kaj kontraŭbatalas la sindikatojn. Poiome, diktatorecaj reĝimoj aperas en la tuta orienta kaj centra Eŭropo: post Sovetunio, Italio, estas Hungario, Pollando, Rumanio... Pli poste sekvas Germanio kaj Hispanio...

... Ĉu tio signifas, ke ĉiuj-ĉi reĝimoj estas "dekstraj"? La afero ne estas simpla, eĉ flanke de la faŝistoj. Multaj el ili malamas la burĝaron samtempe kiam, en Okcidento furoras la liberala kapitalismo. Unu afero, iom poste,

fariĝas certa: en Okcidentaj landoj, kie la krizo de 1929 malpli severas, la tieaj ekonomioj estas pli viglaj, la politikaj reĝimoj malpli aŭtoritatemaj.

Ĉiuj ni bone konas la sekvon de tiu krizo: la Dua Mondmilito, la naziaj teruraĵoj, ankaŭ la